

# Provenca Esperanto-Federacio

kvaronjara gazeto  
**122**  
aŭtuno 2020



leĝa depono ĉe BNF: ISSN 2609-5203

## **federacia retejo**

<http://www.esperanto-provence.org>

## **nia federacio sur Facebook**

<http://www.facebook.com/esperantoprovence>

## **prezidanto**

Pierre Oliva  
Eden Park n° 99  
2772 Montée du Vieux Camp  
83330 Le Castellet  
06 76 55 57 23  
nlpolecamp@gmail.com

## **aliĝkoto (kun la gazeto)**

**6 €**

ĉeko al:

"Espéranto-Provence"  
pere de via loka asocio  
aŭ sendota al la kasisto  
Nicole Lafitte  
(ĉe la supra adreso de  
Pierre Oliva)

## **sekretario**

## **redaktoro kaj enpaĝiganto**

Pascal Vilain  
48 avenue Alexis Godillot  
83400 Hyères  
06 42 19 68 51  
pascalvilain83@gmail.com

**limdato por sendo de  
publikotaĵoj por la venonta n°  
25-a de decembro 2020**

bonvolu sendi al la supra retadreso

><<>

antaŭdankojn pro viaj kontribuaĵoj

## **Vorto de la Prezidanto**

Kian aŭtunan komenciĝon ni travivis! La vetero jam ne plu belas, dum ne malaperis la viruso kaj plu kreskas la nombro de infektitoj! Ni havas neniun certecon pri la venontaj semajnoj kaj monatoj!

Koncerne nian federacion, mi esperas ke ĉiuj kluboj sukcese laboras ree, malgraŭ la sankrizo, same kiel ni en Le Beusset, sen problemoj kaj kun ĉiuj lernantoj niaj.

Komence de la nuna nova sezono, estas tamen ombreto en niaj projektoj: la novembra staĝo en Le Beusset devige estos unutaga; ĝi okazos nur sabaton.

Mi esperas, ke estontece ni ne direktiĝos al pli malbona situacio.

Ĝis baldaŭ en Esperantujo... plej amike...

*Pierre Oliva*



## **enhavo**

2	federacia agado	6	federacianoj aktivas ZEO-oj en Hyères
3	forumoj de asocioj	7	paĝo de la komencantoj
4	el la regionaj asocioj	8	humuraĵoj agendo
5	vojaĝemaj federacianoj	+	reta suplemento pri Reunio

## Federacia agado

### Pascal Vilain

#### Ekzamensesio de FEI

Ĉu pandemio, deviga masko, distanciĝo, uzado de hidroalkohola ĝelo... kapablis senkuraĝigi personojn, kiuj intencis trapasi ekzamenojn de la Franca Esperanto-Instituto? Tute ne! La tri anoncitaj kandidatoj akurate atingis la «Maison des Frères», en Le Beausset, sabaton la 19an de septembro.

Marie-Hélène Bertuceli el Marsejlo kaj Paulette Chiarisoli el Correns preparis sin por la 1a-grada ekzameno, dum Christine Biancheri, sukcese akirinte la 1an nivelon pasintjare, kuraĝe laboris por la 2a-grada.

Atendis ilin Renée Triolle kaj Pascal Vilain, la ekzamenontoj, kaj ankaŭ Nicole Lafitte kaj Pierre Oliva, kiuj pretigis kafon kaj iom da kukaĵoj.

Plaĉa finsomera vetero ebligis trapason de la ekzamenoj ekstere en la parko.

Ĉar ĉiam post penado nepre sekvu refortiĝo, la grupo kune piknikis tagmeze antaŭ ol disiĝi.

Sed... ha, prave... nenio estis dirita pri la ekzamenrezultoj...

Nu... la tri kandidatinoj kontentige sukcesis - gratulojn al ili - kaj jam promesis al si - mi almenaŭ tion imagas - serioze kaj kuraĝe studi plu, cele al trapaso de plia ŝtupo en la ekzamenaro.



#### Nia federacio kaj Espéranto-France



*Malmultaj komitatanoj ĉeestis la laborkunsidon en Parizo. Kelkaj preferis retan partoprenon.*

Pascal Vilain reprezentis nian federacion en la ĝenerala membrokunveno kaj du komitatkunsidoj de Espéranto-France, kiuj okazis en Parizo la 12an kaj 13an de septembro.

Okaze de balotoj organizitaj de nia landa asocio cele al renovigo de parto de ties komitato, **Éric Streichemberger**, kiu ĉijare aliĝis al Espéranto-France kaj sekve iĝis membro de nia Provenca federacio, kandidatiĝis kaj estis elektita. La komitato, kiu kunsidis en Parizo la 13an de septembro, eĉ elektis lin kiel vic-sekretario de Espéranto-France. Espéranto-Provence gratulas lin kaj deziras al li fruktedonan kunlaboradon.

#### Novembra kultura semajnfino

Pro la nunaj sanproblemoj, la Federacio kaj la organizantoj de la staĝo en Le Beausset devige decidis ŝanĝi la programon.

La staĝo iĝos nur unutaga, t.e. ke ĝi okazos nur sabate, la 28an de novembro. Vi do ne tranoktos surloke. Pierre ne pretigos la manĝaĵojn, kiel li faras kutime. Anstataŭe, ni petos, ke vi venu kun viaj propraj piknikaĵoj.

Por pliaj informoj, bonvolu legi - kaj espereble plenigi kaj sendi - la aldonitan aliĝilon.

## Forumoj de asocioj

### Gap (05)



Danke al la asocio "T'es Rien sans la Terre", Espéranto-Gap starigis budon la 13 an de septembro en la sama loko kie kutime okazas la fama Foiro Bio Génépi.

Ne multe da homoj partoprenis, tamen iomete pli junaj vizitis ĝin. Junulo tuj diris: "Se mi lernus Esperanton, mi kantus ĝin".

Malmulte da semoj en 2020 !

Tamen ni ĝojis revidi la aliajn partoprenantojn.

*raportis Monika Arnaud, videbla ĉebude sur la foto*

### La Ciotat (13)

Samedi 12 septembre, le traditionnel Forum des Associations s'est tenu au Domaine de la Tour.

Moins visité que les années précédentes à cause du masque obligatoire, d'un sens unique etc, il a permis quelques contacts. Certains visiteurs nous ont remerciés d'être les seuls à présenter... des livres!

Merci à Marc et Christine (*sur la photo*) qui se sont investis pour assurer la permanence.

*texte de Renée Triolle envoyé à Esperanto-Aktiv"*



### Marseille (13)

La forumo de asocioj, origine planita la 27an de septembro, estis nuligita pro la sankrizo kaj la lastaj reguloj anoncitaj de la prefekto. Tamen, video-intervjuo estis proponita al Espéranto-Marseille.

### Le Beausset (83)

La forumo de asocioj okazis en Le Beausset sabaton la 12an de septembro.

La komenco estis iel trista ĉar mankis duono de la asocioj.

Plie, estis malpermesite foliumi librojn, ludigi la publikon, disdoni bombonojn, k.t.p. !

Rezulto : malpli da vizitantoj ol antaŭe.

Pozitiva flanko tamen estis, ke la promenantoj estis tre parolemaj kaj scivolaj pri Esperanto.

Ankaŭ la nova urbestro pli atente informiĝis ol kutime.

Inter la diversaj vizitantoj, virino ege interesiĝis pri nia asocio, partoprenis en nia unua septembra kurso kaj decidis lerni nian lingvon.

Do, malgraŭ la viruso, la forumo estis pozitiva por ni por la unua fojo.

*raportis Nicole Lafitte kaj Pierre Oliva*

### Saint-Raphaël (83)

La 12an de septembro, 100 lokaj asocioj kaj samtempe 300 ĵusalvenintoj kuniĝis en granda ĝardeno vidalvide al la blua maro. Danke al geamikoj, nia Esperanto-Klubo ĉeestis de la 9a ĝis la 18a por malkovrigi la multajn flankojn de nia Internacia lingvo.

Esperanto konvinkis kelkajn personojn; ni estas pretaj akcepti ilin okaze de nia semajna kunveno, ĉiunmerkrede de la 15a ĝis la 17a en la Domo de Asocioj, strato "de la Soleillette" en Saint-Raphaël.



*raportis Denise Loisel, videbla kun Monique Prezioso sur la foto*



## El la regionaj asocioj

*Vi tutcerte bone komprenos, ke de pluraj monatoj preskaŭ nenio okazis en niaj kluboj. Tamen post la somero rekomenciĝis kursoj, kaj prelego kunigis kelkajn samideanojn en Marsejlo. (n.d.l.r.)*



### 13 - Centre Culturel Espéranto-Marseille

Liliane Alazraki

#### Prelego de Floréal Martorell

Jaŭdon la 10an de septembro, en "Cité des associations" en Marsejlo, je la 18a, la konata "Flo" profitis sian restadon en nia urbo por prelegi pri sia kreaĵo, la fama eldonejo Vinilkosmo. Vinilkosmo estas eldonejo kaj disvendejo de Esperanto-muziko. Ĝi situas apud Tuluzo.



La unuaj eldonaĵoj de Vinilkosmo aperis en 1990. Intertempe eldoniĝis pli ol 30 muzikalbumoj, de pli ol 70 artistoj el la tuta mondo. Multaj estas famaj esperantistoj, kiel JoMo, Kaj tiel plu, Morice Bénin, Jacques Yvart.

La eldonejo postulas altan kvaliton, sed estas malfermita al ĉiuj formoj, ekzemple roko, popo, folko, kanzono, tradicia, punko, hardroko, mondmuziko, elektroniko, regeo, skao, hiphopo, ktp.).



*La 11 numeroj de Rok-Gazet', t.e. la tuta kolekto, estas legeblaj kaj elŝuteblaj ĉi tie.*

Floréal detale prezentis al ni la retejon de Vinilkosmo ([www.vinilkosmo-mp3.com](http://www.vinilkosmo-mp3.com)) konsulteban en la franca, la angla, la hispana kaj kompreneble en esperanto. Tie oni povas mendi la eldonaĵojn, t.e. albumojn fizikajn aŭ elŝuteblajn en formatoj MP3, OGG, aŭ FLAC, legi la blogon por esti informita de la novaĵoj, aŭskulti pecetojn elektante la muziktipojn aŭ la muzikistojn, aboni al la klubo.

Floréal rekomendas la bazan abonon, 10 eŭrojn jare.

VINILKOSMO, "Esperanto-Muzik-Prod."

2 Bis Chemin du Canal FR-31450 DONNEVILLE

Tel : +33 (0)5 61 81 95 65 [vinilkosmo@esperanto.org](mailto:vinilkosmo@esperanto.org)



*Malgraŭ la sankrizo, la prelego allogis sufiĉe da partoprenantoj.*

*samteme :*

Jean-François Cousineau sendis retmesaĝon al Kontakto, la dumonata socikultura revuo de TEJO, Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Ĉi tiu mesaĝo aperis en la lasta numero, 2020:4, je la paĝo 4a.

Bedaŭrante, ke ne plu aperas la iama revuo Rok-Gazet', eldonita de 1990 ĝis 2003, li sugestis al Kontakto aperigi ĉiujaran kromnumeron pri muzik(ist)aj informoj.

Kvankam la respondo de la ĉef-redaktoro estis negativa, pro nebla kroma laboro, Kontakto tamen bonvenigas informojn pri muziko.

## Vojaĝemaj federacioj

### Unu semajno en la Kulturdomo de Esperanto: Kastelo Greziljono

**Marc Gallardo**

La unua «Verda Naturisma Semajno» kunorganizita de la Kulturdomo de Esperanto kaj de INOE (Internacia Naturista Organizo Esperantista) okazis en Kastelo Greziljono de lundo 27-a de julio ĝis sabato 1-a de aŭgusto 2020.



Ni estis akceptitaj de Berto Ŝuman. La organizantoj de Greziljono delegis malgrandan teamon por aranĝi la antaŭrimedojn pri protekto kontraŭ la koronaviruso. Jean-Luc Kristos (Joloko) zorgis pri la studa parto de nia restado.

La unua Verda Naturisma Semajno enhavis diversajn aktivitaĵojn. Ni provis kanti en Esperanto posttagmeze danke al Joloko, kiu akompanis nin per piano. Matene li donis al ni lecionojn kaj ni ĉiuj ŝatis lian tre viglan instruadon en formo de ludoj.



Vespere ni povis ĉeesti prelegojn pri metromapoj tra la mondo (Thierry) kaj naturismo en la mondo (Rosy), en Esperanto kaj en la franca.

Ni ĉeestis en la kastelo kun grupo de naturistoj de FFN (Franca Federacio pri Naturismo) kaj de APNEL (Asocio por Naturismo en Libereco), kiu estis tie por organizi la estontan nacian naturisman festivalon okazontan la 3an kaj la 4an de julio 2021. Ĉi tiu venonta festivalo certe havos grandan sukceson, se konsideri la grandiozan agadplanon.

La neesperantistaj naturistoj povis nude ekskursi, kaj ni kelkfoje aliĝis al ili. Ni promenadis en la parko por malkovri la lokajn flaŭron kaj faŭnon.

Entute, ni estis ĉirkaŭ dek kvin partoprenantoj, inkluzive grandan grupon de INOE-membroj. Inter ili, multaj estas ankaŭ anoj de Espéranto-Provence.

La kastelo havas tre grandan parkon, gravajn akcepteblajn kaj lokojn por spektakloj same taŭgajn por grandkvanta partopreno. Ĝi povus iĝi tiel fama kiel Woodstock sed sen la Rulantaj Ŝtonoj (Rolling Stones) pro buĝetkialo.

La manĝoj estis ege (tro ?) bonaj kaj persone mi gajnis 3 kilogramojn en la semajno. Sed pli bone ol male, ĉu ne?

La regiono estas tre bela kaj ni povis viziti la ĉirkaŭaĵon kaj ankaŭ naturisman kampadejon situantan proksime de la kastelo: NatAnjou. Ni estis tre bone akceptitaj tie. Post naĝado en la naĝejo de la centro, ni ŝatis la aperitivan proponitan al ni. Grandan dankon al niaj gastigantoj.

Ni forlasis la kastelon kun bedaŭro, promesante al ni reveni venontjare por partopreni en la festivalo kaj al la dua Verda Naturisma Semajno.

### Bicikle tra Eŭropo

**Alain Rémy**

Mia vojaĝo 2020: 5 101 km tra 8 landoj.

> Italujo, Slovenujo, Hungarujo, Aŭstrujo, Germanujo, Nederlando, Belgujo, Francujo.

Kiel kutime, mi renkontiĝis kun esperantistoj kaj eĉ foje tranoktis ĉe ili.

Ekde 2010, mi jam traveturis 127 000 km per mia kuŝbiciklo!



## Federacianoj aktivas... eĉ somere...

**Renée Triolle** gvidis kurson okaze de staĝo en Métabief, en Ĵuraso, de la 23a ĝis la 29a de aŭgusto.

Jen tio, kion skribis prie Liba Gabalda: «*Plej fluajn parolantojn Renée Triolle instigis al legado de diversaj tekstoj kaj sekvis diskutado. Ni traktis diversajn temojn: pri rubaĵoj, kafo, topinamburo, pandemio, atom-centraloj, sekreta vivo de lavmaŝinoj, Marjorie Boulton, judoj kaj holokaŭsto, indiĝenaj lingvoj en Sud-ameriko, mikrokreditoj, ktp. Ne mankis iom da gramatika ekzercado.*»

**Nicole Lafitte** kaj **Pascal Vilain** regule partoprenas en verkateliero, «OkMinutoj», iniciatita de Anna Löwenstein dum pasintaŭtuna staĝo en Greziljono.

Unu teksto skribita ĉiusemajne... tio signifas, ke ili baldaŭ estos skribintaj 52 tekstojn. La grupo ne plu estas alirebla por novaj verkemuloj.

**Jean-François Cousineau** iĝis ĉefkorektanto de la dumonata revuo «Espéranto-info», kiun aperigas la samnoma asocio.

**Maggy kaj Philippe Combot** partoprenis en la virtuala bankedo okaze de la reta Universala kongreso de UEA. Temis pri virtuala prezentado de naciaj pladoj el la tuta mondo.

Ili sendis receptojn el Reunio, kiujn vi trovos en la aldonita dosiero fine de ĉi tiu gazeto, se vi ricevas la retan version.

Alvoko al  
Kunmanĝado tra la  
Mondo

## ZEO-oj en Regiono SUD > 10 - Hyères (83)

### Pascal Vilain

Mia enketo pri la ZEO-oj de Hyères estis ĉifoje pli facila ol kutime.

Mi ne telefonis, nek mesaĝis, nek petis fotojn... sed mem vizitis, kun Mari-Roza, la urbodomon, arkivejon kaj bibliotekon, kie ni estis ĉiam varme akceptitaj. Responsulo de la urba biblioteko eĉ kreis Esperantan konsulteban datenaron.

Jen kelkaj el la plukitaj informoj: klubo «Verda Stelo» estis kreita la 1an de oktobro 1933. La 17an de majo 1936, okaze de la 7a regiona Kongreso, estis inaŭgurita la 1a strato Zamenhof. Unua ĉar alia kvartalo estis elektita por nova «Rue Docteur Zamenhof», inaŭgurita en marto 1969. Sekvis en marto 1984 «Impasse Docteur Zamenhof», samkvartale.

En majo 2009 venis plia ZEO-o kiam ekis konstruado de «Résidence L'Espéranto», loĝata ekde 2010.



Kiel foje okazas, la familia nomo Zamenhof ne ĉiam estas bone skribita. En kelkaj urboj videblas iuj Zamenhoff, sed en Hyères, se aldoniĝis sur ŝildo troa "f", ankaŭ malaperis litero, el kio naskiĝis la nomo Zamenoff.

Fine, mi nepre trankviligu vin: dediĉo de sia vivo al la idealo de Zamenhof tute ne estas mortdanĝera! Male, tio estas entuziasmiga!



## Paĝo de la komencantoj

### Sumoo

Sumoo estas japana tradicia lukto. Ĉiun jaron okazas 6 konkursoj en neparaj monatoj: januaro, marto, majo, julio, septembro, kaj novembro. Unu konkurso daŭras 15 tagojn.

### Esperanto-Sumoo

Esperanto-Sumoo estis elpensita, por ke esperantistoj legu Esperanto-librojn.

Dum la tempo, kiam dikaj sumooistoj luktas en Japanio, ni esperantistoj legas librojn en Esperanto.

Antaŭ la aranĝo ni elektas libron, kiun ni legos, kaj decidas kiom da paĝoj ni legos ĉiutage.

Se ni plenumas nian tagan taskon, ni havas unu venkon. Tiamaniere ni luktadas 15 tagojn.

Sumooistoj en Japanio luktas kontraŭ aliaj luktistoj, sed ni esperantistoj luktas nur kontraŭ malfortoj de nia propra personeco.

Por pli da informoj pri la sumoo, rigardu ĝian retejon ĉe: <http://www.esperanto-sumoo.pl/>



**Plurelekta demandaro**  
*laŭ verkoj de Robert Llorens*  
*eldonitaj de Esperanto-Info*

#### 1 - gramatika

a) La najbaro havas belan domon ..... domo estas moderna.

1 - lia ; 2 - ŝia ; 3 - ĝia

b) Ni iros viziti vin nur tiam ..... vi telefonos.

1 - ke ; 2 - kiam ; 3 - kio

c) Kiam vi alvenos, ..... ni kune iros promeni.

1 - tiam ; 2 - tie ; 3 - tiel

#### 2 - vorto-trezora

ĉ) elektu "admono", "averto" aŭ "invito" por traduki la francan "avertissement"

1 - pour informer : .....

2 - en droit : .....

3 - observation : .....

d) elektu "aperturo", "bero" aŭ "golfeto" por traduki la francan "baie"

1 - en archéologie : .....

2 - en botanique : .....

3 - en géographie : .....



**Superzam'**  
*proponita de*  
*Jean-François Cousineau*

1. En kioma jaro okazis la 1a Afrika Universala Kongreso?

a- 1962 b- 1979 c- neniam

2. Kiu verkis la novelaron Verdaj Donkiĥotoj en 1933? a- Kabe b- Piron c- Baghy

3. De kiu lando estas la muzikgrupo Kajto?

a- Belgio b- Nederlando c- Svedio

4. Kio estis la patro de la edzino de Zamenhof?

a- instruisto b- notario c- komercisto

5. Kiu korelativa ekaĵo signas nedifinecon?

a- i- b- nen- c- ĉ-

6. Kiu el la jenaj estas la plej granda insulo en la mondo?

a- Borneo b- Madagascaro c- Nov-Gineo

#### Plurelekta demandaro

##### 1 - gramatika

a : 3 ; b : 3 ; c : 3

##### 2 - vorto-trezora

ĉ1 : antaŭpago ; ĉ2 : avanco ; ĉ3 : fruenco

d1 : per ; d2 : krom ; d3 : kun

#### Solvoj de la demandoj

en EP 120

printempo 2020

#### Superzam'

1 c > Usono

2 a > Baghy ; 3 a > 4

4 a > Bjalistoko ; 5 b > t

6 b > Kanado (10M km<sup>2</sup>)



## À noter sur votre agenda

Dans le n° 121 du début d'été, il était écrit ici-même que la crise sanitaire était toujours d'actualité et qu'il ne fallait pas écarter la possibilité d'une deuxième vague d'attaque virale accompagnée d'une nouvelle période de confinement. Eh bien rien n'a changé, nous en sommes toujours là, et les dates indiquées ci-dessous ne le sont toujours qu'à titre indicatif.

Si vous êtes en manque de rencontres et si le virtuel ne vous rebute pas, sachez que le site "Eventa Servo" vous donne la possibilité de vous connecter à de nombreuses discussions en ligne. À consommer sans modération !

### dans notre fédération

**1er jeudi de chaque mois - 18 h - Marseille**

*(si les bars marseillais peuvent ouvrir)*

Café linguistique - Brasserie Les Danaïdes  
4 square Stalingrad, 13001 Marseille

**dernier mercredi de chaque mois - 18 h - Hyères**

Café linguistique - bar de l'hôtel Ibis-Gare  
45 rue Edith Cavell (face à la gare)

**novembre 28 - Le Beausset**

Samedi culturel

*(bulletin d'adhésion joint à ce numéro)*

**2021 - février 27 / mars 6 - Les Issambres**

MES (Mediterranea Esperanto-Semajno)

*Attention: Ces dates étaient celles qui avaient été prévues, mais le stage sera très certainement annulé, les assurances ne voulant pas prendre en charge le risque d'une annulation imposée par les autorités.  
pour infos : 04 94 83 06 88 ou 04 89 99 87 48*

### en France

**Baugé (49) - Château de Grésillon**

**octobre 19-25** - plusieurs activités culturelles

**octobre 25 / novembre 1**

AŬTUNE - AŬtuna TUmulta NEsto

9-èmes vacances pour enfants, familles, grands-parents - Cours et activités variées, programme pour les enfants - <http://gresillon.org/?lang=fr>

**Bouresse (86) - Kvinpetalo**

**octobre 19-23** - deux sessions de cours parallèles

<http://www.kvinpetalo.org/?lang=fr>

**février 20-27 - La Bastide-sur-l'Hers (09)**

27ème stage de chant choral

tutpeko@aliceadsl.fr

### en Europe

**décembre 28 / janvier 3 - Bielefeld (Allemagne)**

LUMINESK' : fête du nouvel an

[demand@luminesk.de](mailto:demand@luminesk.de)



# Reuniaj receptoj

## Pirata punĉo



### Ingrediencoj

Oranĝoj (4)  
Citronoj (4)  
Ananaso (1/2)  
Blanka rumo (50 cl.)  
Blanka vino, nedolĉa (seka) (25 cl.)  
Muskato (1 pinĉopreno)  
Cinamo (1 pinĉopreno)  
Vanilo (1 guŝo)

### Por 6 ĝis 8 personoj

Preparado: 15 minutoj  
Ripozo : 2 horoj en fridujo

Sur la foto ĉi-supra la punĉon akompanas tipe Reuniaj frititaj manĝaĵoj : "samoussas" (tranguloj farĉitaj per diversaj produktoj, fiŝo, viando aŭ fromaĝo) kaj "bonbons piments" (buloj aŭ toroj el miksaĵo de multaj spicoj kaj piza kaĉo).

### Preparado

- Elpremu la sukcon de 3 oranĝoj kaj 2 citronoj
- Verŝu en grandan salatuĵon
- Tranĉu la duonan ananason en pecojn kaj aldonu la pecojn kaj la sukcon
- Aldonu la rumon kaj la vinon
- Dissemu la pulvoron de cinamo kaj muskato. Miksu.
- Tranĉu 1 oranĝon kaj 1 citronon en maldikajn tranĉojn. Fendu la vanilan guŝon en du partojn. Aldonu al la preparaĵo.
- Lasu 2 horojn en la fridujo.

# Gratenaĵo de batatoj kun ricotta kaj spicherboj



## Ingrediencoj

- Batatoj (4)
- Bukedo da petroselo
- Bukedo da cerefolio
- Bukedo da ŝenoprazo
- Ricotta (500 gr.) [[ricotta](#) estas Itala fromaĝo]
- Lakto (30 cl.)
- Ovoj (2)
- Salo kaj pipro
- Oleo aŭ butero (por ŝmiri)

## Por 6 personoj

Preparado: 10 minutoj (+ 15 minutoj por la vaporkuirado)

Kuirado: 1 horo kaj duono

## Preparado

- Antaŭvarmigu la fornon je 150 gradoj
- Kuiru la batatojn per vapore
- Tranĉu ilin en maldikajn tranĉaĵojn
- Aparte konservu kelkajn tigojn de ŝenoprazo. La ceterajn herbojn dishaketu en malgrandajn erojn. Miksu kun la ricotta. Aldonu salon kaj pipron.
- Ŝmiru per butero aŭ oleo la fundon de gratena plado. Verŝu la preparaĵon. Super ĝin metu la batatajn tranĉaĵojn.
- Vipu la ovojn en la lakto. Aldonu salon kaj pipron. Verŝu sur la batatojn.
- Metu en la fornon. Lasu dum 1 horo kaj duono.
- Dissemu hakitan ŝenoprazon sur la gratenaĵon antaŭ ol servi.

# Plado de salikokoj

## Ingrediencoj

Salikokoj (500 gr.)  
Cepo (1, aŭ pli, laŭplaĉe)  
Timiano  
Zingibro (1 peco)  
Ajlo (1)  
Kapsiketoj (laŭplaĉe, ne devige)  
Tomatoj (6)  
Kurkumo (1 supkuleron)  
Salo kaj pipro  
Oleo



## Por 4 personoj

Preparado: 10 minutoj

Kuirado: 15 minutoj

## Preparado

- Fritu la cepojn kaj aldonu la spicojn: timianon, ajlon, zingibron, salon, pipron. (Oni povas aldoni kapsiketojn.)
- Haku la tomatojn. Miksu kun la cepoj. Aldonu la kurkumon.
- Almetu la salikokojn kun du glasoj da akvo aŭ da buljono.
- Miksu kaj kuiru 5 minutojn.

## Servado

- Oni servu tiun pladon kun kardamome parfumita rizo.
- Oni krome prezentu peklaĵon de legomoj. ([aĉardo](#): tipa manĝaĵo de la Hinda Oceano ; sur la foto ĉi tie temas pri peklaĵo de koro de speciala palmarbo, *Acanthophoenix rubra* [[ruĝa palmarbo](#)].)
- Estas kutimo en Reunio aldoni pladeton da lentoj



# Kokosa flaŭno

## Ingrediencoj

Sukerita koncentrita lakto (40 cl.)

Kokosa lakto (40 cl.)

Raspita kokoso (60 gr.

+ pinĉpreno por ornamo)

Likva karamelo (1 supkulero)

Ovoj (4)

Muskato (1 pinĉopreno)

Pulvoro de vanilo (1 pinĉopreno)

## Por 8 personoj

Preparado: 15 minutoj

Kuirado: 55 minutoj

Ripozo: 2 horoj



## Preparado

- Antaŭvarmigu la fornon je 180 gradoj
- Miksu la koncentritan lakton kun la kokosa lakto
- Vipu la ovojn kaj aldonu al tiu miksaĵo
- Aldonu la muskaton, la raspitan kokoson kaj la vanilan pulvoron. Vipu la tuton dum kelkaj minutoj
- Ŝmiru la fundon de longa kuka muldilo per la likva karamelo, kaj super ĝin verŝu la preparaĵon
- Metu tiun muldilon en pladon kun iom da akvo en la fundo. Kaj metu en la fornon. Lasu proksimume 1 horon, kontrolu la bakadon per tranĉilo aŭ stango.
- Lasu malvarmiĝi. Elprenu el la muldilo. Lasu en fridujo dum almenaŭ 2 horoj.
- Antaŭ ol servi ornamu per raspita kokoso.